



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:

Eksterlande: 4 pesetoj
Enlande: 3 pesetoj

ADRESO:

València, 245 - BARCELONA



XVII Kataluna Esperanto-Kongreso

La Organiza Komitato de nia XVII Kongreso povas esti fiera pri la rezultato de la nunjara esperantista festo. Tiom da klopodoj kaj laborado povis havi nur unu decan premion kaj tiu premio estis malavare donita de la katalunaj esperantistoj, kiuj multnombre respondis al la alvokoj kaj dank' al ili ĉiuj aranĝoj bone disvolviĝis. Nur laŭdojn ni povas esprimi kaj per tio ni respegulas la senton de ĉiuj partoprenintoj, kiuj kun bedaŭro forlasis la belan urbon, kiu dum kelka tempo estis la centro de la kataluna esperanto-movado. Al ĉiuj kunlaborintoj en la preparaj laboroj de la Kongreso ni esprimas niajn plej koraajn dankojn kaj precipe al nia laborema nova kunbatalanto, S-ro. Antoni Planes, sub kies gvido ĉio glate disvolviĝis kaj ĉiu baro estis transsaltita.

La amplekso de nia gazeto ne donas al ni la eblon fari detalan raporton pri la diversaj aspektoj de la Kongreso kaj tial ni faros resumon pri la ĉefaj okazintaĵoj akceptante tiujn punktojn, kiuj povas havi ĝeneralan intereson.

Malferma Kunsido.

Granda plimulto da kongresanoj alvenis en la anoncita oficiala vagonaro kaj ankaŭ granda nombro uzis specialajn aŭtobusojn. Ni vidis aŭtobusojn el Manresa, Sabadell, Roses, Vendrell, Terrassa, k. t. p. Aliaj kongresanoj alvenis la antaŭan tagon, sabaton, la 8-an de junio, kaj tiuj havis okazon aŭskulti la interesan paroladon de profesoro Delfí Dalmau, pri «L'esperanto que no sabeu que sapigueu» okazintan kun granda sukceso en la sidejo de Cooperativa Econòmica Ripollesa.

Je 10-a, dimanĉon, la 9-an de junio, en la Urbdomo, la reprezentanto de la urbestro, S-ro. Lluís Gaiolà, akceptis la 250 gekongresanojn kaj en la nomo de la urbo salutis la esperantistojn per parolado de altaj konceptoj, plena de laŭdoj al la tasko de la esperantistoj, kiujn li instigis daŭrigi en la laboro por la bela idealo. Tuj poste la prezidanto de K. E. F. sinjoro Sebastià Alberic Jofrè, dankas la urbestron kaj la diversajn aŭtoritatulojn, kiuj kun li prezidas la kunsidon. La ĉeestantoj fervore aplaŭdas la reprezentantojn de la urbo kaj post tio la prezidanto alparolas jene la gekongresanojn:

Estimataj gesamideanoj: Kataluna Esperantista Federacio salutis vin plej kore en la bela okazo de la XVII Kataluna Esperanto-Kongreso.

Dum nia pilgrimado tra la katalunaj urboj, neniu okazo prezentigis kun tiel bonŝancaj aŭguroj, kiel tiu de la Kongreso, kiun ni komencas nun kaj en kiu ni povas vidi reprezentantojn de ĉiuj enlandaj esperantistaj organizaĵoj, kiuj venis al Ripoll por novafoje pruvi kiel profunde ni sentas la sanktan idealon kaj kiom ni amas la celon, kiu kunligas nin en la batalado por dua lingvo.

La XVII Kongreso prezentas ŝancon de praktika sukceso ĉar post la aliĝo de novaj grupoj, kiuj venis en niajn vicojn, ni esperas, ke la ceteraj, kiuj ne alprenis ankoraŭ tiun decidon, povos konstati dum la Kongreso, ke la tuta strukturo de Kataluna Esperantista Federacio ripozas sur demokratiaj bazoj, kiuj donas al ĉiu la eblecon montri la plej taŭgajn vojojn por la plua batalado por esperanto. Ni ĉiuj havas la samajn rajtojn kaj la samajn devojn. Ni egale staras antaŭ K. E. F., kiu povas havi nur tiajn trajtojn, kiajn ĝiaj membroj postulas.

Longan vojon iris la esperantistoj de post tiu bela tago de julio de 1887, kiam Dro. Zamenhof donis al la homoj sian grandan verkon. Ni iris longan vojon kaj pli longa vojo etendas sin antaŭ ni, ĝis la homoj komprenos nin kaj akceptos de-

finitive internacian lingvon. La homaro estas freneza plej ofte kaj ne taksas ĝustamezure la solvojn, kiujn ĝi havas antaŭ siaj okuloj. Ĝi baraktas en lingva ĥaoso, kreas konfliktojn kaj iras en mallumo, dum hela suno sendas siajn radiojn. Vidu kiom multaj tiel nomataj eminentaj homoj emfaze asertas, ke artefarita lingvo ne estas vivanta lingvo, ke ĝi disfalus en dialektojn, se iam ĝi estus alprenita de ĉiuj nacioj. Tiaj eminentuloj subtenas tian teorion dum ni, kiuj ja ne estas eminentuloj, konstatis plurfoje, ke esperanto plene servas por la internaciaj rilatoj, dum ni povis vivi tiel belajn tagojn en niaj universalaj kongresoj, en kiuj unu lingvo sonas agrable el ĉiuj buŝoj kaj la lingva egaleco plene sukcesas.

Se esperanto havas grandan estontecon en la internaciaj kampoj de komerco, turismo, radio, k. t. p. pli altnivelan estontecon ĝi havas en malgrandaj nacioj, kies lingvoj batalas kontraŭ la premado kaj puŝado de aliaj lingvoj. Mi ne estus sincera, se mi ne dirus, ke tiu aspekto de la lingvo internacia estas la esenco kaj bazo de mia multjara batalado por esperanto. Ĝuste tiu fajro estis la kerno de la tuta laboro de la kreinto de esperanto. Dro. Zamenhof kreis sian verkon por forigi lingvajn humiligojn kaj per tio repacigi la homojn, kiuj parolas malsamajn lingvojn kaj opinias sian lingvon kun rajto super la aliaj. Tial iu senkonscia homo povas opinii, ke ĉeĥoj devas cedi al germana lingvo, finnoj kaj estonoj al rusa, flandroj al franca, k. t. p. sed se ni povas pardoni al neesperantisto tian maljustan opinionon, ni ne povas tion fari al esperantisto, kiu povas plej alte ŝati kaj estimi sian gepatran lingvon sed ne havas la rajton pretendi, eĉ opinii, ke lia lingvo, pro iaj politikaj cirkonstancoj aŭ ŝajnaj historiaj rajtoj, povas esti altrudata al alia homo, kiu havas sian propran esprimmanieron, ĉu oficialan aŭ ne, tio estas absolute indiferenta.

Se en la esperantistaj vicoj regus malamikeco pro la lingvaj diferencoj, ni ne havus la rajton proponi al la mondo solvon, kiu malsukcesas ĉe ĝiaj subtenantoj.

Kaj nun ni diru kelkajn vortojn pri la arĝentjubleo de Kataluna Esperantista Federacio. Tio estis en majo de 1910 kiam nia Federacio havis sian unuan Kongreson en Sabadell. Tiam, post la granda sukceso de la V Universala Kongreso okazinta la antaŭan jaron en Barcelona, nia movado estis vigla kaj potenca. Ĉio parolis pri esperanto kaj ĉiu homo havis belan ideon pri ĝi. En tiu tempo regis super la esperantistoj la sankta flamo de la interna ideo kaj mistika sento imunigis ilin de la moko ĉirkaŭantaj la tiamajn batalantojn. Nun la in-

terna ideo perdis sian efikon kaj la homoj ne plu pliridas nin. Danke al la tiamaj fervoruloj nia afero trovis stabilan centron: K. E. F. faris siajn unuajn paŝojn en la kataluna esperanto-movado. Ĝi travivis ventegojn, oni fosis sub ĝiaj piedoj plurfoje, sed ĝi ne dronis. El la bataloj kaj batoj ĝi eliris kun nova forto. Hodiaŭ ni portas al vi la malnovan standardon sub kiu ni preĝu kun fervoro por la fina venko de esperanto. Akceptu ĝin kun larĝa koro kaj donu al ĝi vian tutan entuziasmon kaj sindonemon. Estu K. E. F. la hejmo de ĉiuj katalunaj esperantistoj. Vivu ĝi longe por la bono de nia afero en la tuta lando.

Bonvenon al vi, karaj gesamideanoj.

S-ro. Rafael Gisbert, sekretario, legas salutleterojn kaj telegramojn de Elinjo Pähn, Grupo Laborista Esperantista el Valencio, Grupo Frateco el Vendrell, Pastro Casanovas el Girona, Esperantista Grupo Flugiloj el Cassà de la Selva, Alice Brosse el Namur (Belgujo), Pere Domènec el Vilassar de Mar, k. t. p.

La sekvantaj reprezentantoj salutas la Kongreson: Fraŭlino Gregòria Gasadesús el Esperanto-Grupo Ripoll; S-ro. Josep Coll el Ligo de Esperantistaj Fervojistoj; S-ro. Sebastià Chaler el Lumon (Terrassa); S-ro. Bulbena el Aplec (Sabadell); S-ro. Capdevila el Barcelona Stelo (Barcelona); S-ro. Estivill el Esperanto-Grupo Ripoll; S-ro. Armengol el Empordana Ebenajo (Armentera); S-ro. Muset el Bela Espero (Manresa); S-ro. Pous el Esperanto-Grupo Vic; S-ro. Nagore el Paco kaj Amo (Barcelona); S-ro. Navarro el Enciklopedia Akademio Espero (Barcelona); S-ro. Peris el Nova Sento (Barcelona); S-ro. Mangada en la nomo de Hispana Esperanto-Asocio; Fino. Castel en la nomo de la franca karavano kaj de la esperantistoj de Toulouse; S-ro. Prabucki, polo, salutas kun sia granda entuziasmo kaj laŭdas la Kongreson. S-ro. Marcè el Frateco de Vendrell salutis en la Labora Kunsido pro tio ke lia karavano alvenis pli poste.

Rimarkinde ke Fino. Gregòria Casadesús en la nomo de la lokaj esperantistoj eldiris belan bonvenparoladon.

La prezidanto dankas ĉiujn parolintojn, donas diversajn instrukciojn pri la postaj festoj kaj kunvenoj kaj fermas la Kunsidon.

XVIaj. INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Same kiel dum antaŭaj Kongresoj de K. E. F., okazis la XVI^a. Festo de la Internaciaj Floraj Ludoj kun la plej granda sukceso kaj brilo. La bela kaj vasta teatro de la «Casino de Ripoll» brile aspektis. La tuta loĝantaro de Ripoll interesigis pri la Ama Festo kaj ĉarmaj belulinoj, distingindaj familioj kaj scivolema popolamaso plenigis la loĝiojn, la parteron kaj etaĝon de la granda teatro.

La scenejo estis ornamita per la verdaj standardoj de la Grupoj kaj riĉa trono por la Reĝino kaj aro da brakseĝoj por la Korteganinoj.

Je la duono de la dekdua aperas sur la scenejo la Aŭtoritatoj de Ripoll, reprezentantoj de la enurbaj gravaj societoj, la ĉeestantaj membroj de la juĝantaro kaj la komitato de Kataluna Esperantista Federacio.

Kiam silento fariĝis, sinjoro urbestro J. Gaiolà, prononcas la esperantajn vortojn: «Oni malfermas la feston».

La sekretario S-ro. Joan Gili Norta, stariĝas kaj alpaŝinte al tribuno dekstre de la scenejo, eklegas la raporton:

«Sinjorinoj kaj sinjoroj:

»Jen por la XVIa fojo nia amata Kataluna Esperantista Federacio vokis la tutmondan verkistaron al la rava festo de niaj Floraj Ludoj. Jen, fine, ni estas ĉe la sojlo de tiu ĉi festo, unika festo de ĉarmo kaj beleco.

»Certe nur pro mia fervora laboro en la kataluna esperanto-movado en ĉiuj tempoj, estis mi elektita por la peza posteno de Sekretario de la nunaj Floraj Ludoj kaj tial, nemeritate, mi havas nun la altan honoron raporti al vi la taskon de la juĝantaro.

»Elĉerpitaj de miaj antaŭaj kolegoj, la Sekretarioj de niaj Floraj Ludoj, la laŭdoj ĉiuspecaj al nia ravanta poezia festo, ni konstata la fakton, kiu per si mem estas la plej forta esprimo de laŭdo, ke nia literatura festo atingis la plej grandan internaciecon, kion pruvas la 112 verkoj el 19 landoj ricevitaj por la nuna konkurso.

»Realaj aferoj regas la vivon de la homoj; praktikuloj ŝajne estas la nuraj kondukantoj de la Homaro: sed, en efektiveco, nur la revantoj gvidas ĉion al ĝia destino kaj sukcesigas la aferon. Ni do ĝoju ke ni helpis la kulturadon de nia literaturo kaj ricevis el ĝi konstaton pri reala vivo, pri fortikeco ĉion promesanta.

» Malfacila kaj peza tasko estis por la Juĝantaro legi kaj verdikti la tutan kolekton da verkoj ricevitaj. Mi transiru tuj al detalo kaj proklamu la gajnintojn.

» La Trono de la Poezio restas ankoraŭ neokupita, estas jam tempo levi la vualon de l' templo de la Poezio kaj akompanu min kaj ekgustumu la fruktojn de nia abunda rikolto. Ni malkovru la nomon de la laŭreato per la plej alta honora premio: la Natura Floro, kiu havigos al ni la nekutiman ĝojon esti vasaloj de plej rava reĝino.

» Gesinjoroj: Mi havas la honoron proklami Fraŭlinon MADELEINE VUILLE (Mad Mevo) el Genève (Svislando) kiel gajninton de la Natura Floro.

» Ni ĝoju, ke en la nuna okazo la poetino bonvolis honorigian katalunan landon elektante por okupi tiun altan tronon kaj la oficon de reĝino enlandan fraŭlinon. Mia koro batas emocie diskonigante la nomon de nia Reĝino. Ŝi petis de nia simpatia Fraŭlino EMILIA RIBA PASOLA ke ŝi okupu nian Tronon. Ŝia regado estu de ni kore akceptata, per laŭta aklamado, per tondra aplaŭdado ni tion al ŝi esprimu. Ĉar la premiita poetino ne povis persone ĉeesti kaj kolekti vian admiron kaj aplaŭdojn ŝi bonvolis transdoni sian reprezentacon al S-ro. Francisko Vilà el Barcelona.»

La reprezentanto de la premiita poeto suriras la scenejon kaj ricevas de la Prezidanto de K. E. F. S-ro. S. Alberic Jofrè belegan kaj grandan bukedon de floroj, kiun li iras proponi al la Reĝino, akompanata de diversaj eminentuloj.

Post mallonga paŭzo, muzikistaro ekludas triumfan marŝon ĉe la momento kiam eniras la teatron ŝia Reĝina Moŝto kaj ŝiaj kunulinoj de la Ama Kortego, kiuj de la brako de siaj akompanantoj iras okupi sur la scenejo la lokojn al ili rezervitajn. Per ovacio salutas ilin la staranta ĉeestantaro.

Ŝia Reĝina Moŝto sidiĝas ĉe la Trono kaj la Korteganinoj, Fraŭlinoj Anna Coma, Teresa Vivet, Modesta Morera, Anna Isidro, Maria Sala kaj Mercè Sala sidiĝas ankaŭ ĉirkaŭ ŝi, formante elegantan kaj belegan bukedon. Ĉiuj estis vestitaj per blankaj vestaĵoj kaj speciale ni devas atentigi la gracion de la du paĝioj, infanoj Maria Teresa Solé kaj Maria Mercè Català, kiuj akompanis la Reĝinon.

Kiam la aplaŭdoj de admiro estas ĉesintaj, la Sekretario daŭrigas la legadon de sia raporto:

«Reĝina Moŝto:

»Ĝentilaj Korteganinoj:

»Koran saluton al vi por la granda honoro, kiun vi faris

al ni kaj al nia internacia poezia festo, akceptante ĝin prezidi per via ĉarmo kaj beleco neniam sufiĉe laŭdataj de miaj senpovaj vortoj. Dankon, koran dankon,

» Respektindaj aŭtoritatuloj:

» Eminentaj reprezentantoj:

» Sinjorinoj kaj sinjoroj:

» Gesamideanoj:

» Permesu nun ke mi laŭvice diskonigu la nomojn de la elektitoj triumfintaj en la spirita lukto, al kiu ni ilin invitis. Jen ili:

Ordinaraj Temoj

Dudek verkojn ni ricevis por la unua ordinara temo: Originala versaĵo pri amo. Malfacila tasko elekti inter ili la plej belan. Unuanime la juĝantaro voĉdonis por la n-ro. 89 «Mia amo», devizita «Najtingal», al kiu ni aljuĝis la Naturan Floron. Ĝi estas soneto, kiu havas ĝustan ritmon, ĉefe la du lastaj trilineaj strofoj estas tre belaj, tre harmoniaj. La aŭtorino estas fraŭlino Madeleine Vuille (Mad Mevo), el Genève. Sinjoro Francisko Vilà, kiu ŝin reprezentas, bonvolos legi la premiitan versaĵon.

S-ro. Vilà stariĝas kaj bele deklamas la versaĵon:

MIA AMO

Simile al rivero bru-akva kaj rapida,
Torentas mia amo sur voj' de la viv'
Kaj arde ĝi versadas, en vigla kor-aktiv',
La ondojn plej pasiajn de l' sento nedivida.

Simile al la monto majeste bel-solida,
Klarege siluetas, en firma efektiv',
La amo mia granda, potenca en masiv',
Profunda kaj senlima, kun volo plej decida.

Simile al muziko je dolĉa la akcent',
Vibradas mia amo en sono harmonia,
Kun noblaj la agordoj de la sincera sent'.

Simile al violo parfuma kaj gracia,
Floradas mia amo intime en silent',
Ĝuante la feliĉon en revo emocia...

MADELEINE VUILLE (Mad. Mevo).

Grandaj aplaŭdoj kronas la legadon, kiu estis majstre farita de S-ro. Vilà, de ĉiuj katalunoj bone konata rapsodo.

Menciindaj verkoj: n-ro. 90 «Utopio», kies aŭtoro estas S-ro. Robert Ŝwietoszewski el Wyszogrod (Polujo). Legis la poezion S-ro. Josep Salat el Vic, meritinte multajn aplaŭdojn.

Alian mencion meritis la verko n-ro. 94 «La am' de mia kor» verkita de S-ro Kirschbauer Elemér el Rakoshegy (Hungarujo). La verko estis ankaŭ legita de S-ro. Rafael Gisbert el Barcelona, meritinte ĉies aplaŭdojn.

Trian mencion ni difinis al la verko n-ro. 75 devizita: «Nostalgia Fantazio» kies aŭtoro estas S-ro. M. Strümpfel el Lösnitz (Saksujo). Legis la poezion S-ro. Josep Banet el Barcelona kaj estis tre multe aplaŭdata.

Lastan mencion ni difinis al la verko n-ro. 97 «La ekesto de la Amo», kiu reprezentas grandegan laboron, sed kiu ne ĉiam estas laŭpoezie korekta. La aŭtoro estas S-ro. Stevan Zivanović el Beograd (Jugoslavio).

Nur tri verkojn ni envicigis sub la difino «Originalaj prozaĵoj amaj». Unuanime ni difinis la premion al la bela skizo «Vivo, morto kaj amo» n-ro. 45 — kies aŭtorino estas 16 jara lemantino en Estonio, F-ino Vera Gutmann el Tallinn.

Tradukitaj Tekstoj

Niaj katalunaj verkistoj kaj poetoj malmulte konkursis en la nunjara festo, ni tion ege bedaŭras kaj ankaŭ ni same plendas, ke neniu entreprenis la tradukon de iu versaĵo de Maragall. Tial ni ne povis aljuĝi la proponitan premion.

Nur du verkojn ni ricevis konkursantajn la premion al la plej bona traduko de la kataluna rakonto de S-ro. Prudenci Bertrana «Sobre la mandra». Sendube la laboro estas ja malfacila kaj timigis niajn amikojn. Sincere ni kredas, ke neniu el ambaŭ ricevitaj tradukoj estas plene korektaj. Tamen plej multajn voĉdonojn ricevis tiu, kies devizo estas: «Nenian vorton krom la fundamentajn» n-ro. 32. Ni konstata, ke tiu ĉi traduko kun siaj konfuzigaj ĉirkaŭfrazoj estas iom kapturniga. Zamenhof ne kontraŭstaris la enkondukon de fakaj esprimoj. Krom la ordinara premio la gajnanto ricevis 50 pesetojn kiel premion, malavare donacitajn de nia malnova samideano S-ro. Ramon Soler. La aŭtoro de la tradukita verko estas S-ro. Samuel Roca Rodó el Barcelona.

Bela traduko estas ankaŭ tiu sub n-ro. 33 devizita «Ĉu bonstile?» al kiu ni aljuĝis la honoran mencion. Ĝia aŭtoro estas S-ro. Josep Banet el Barcelona.

Eksterordinaraj Temoj

Difinitaj Temoj:

Premio de KATALUNA ESPERANTISTO — Temo: Kiel oni faras bonstilan versan tradukon. Ne konkursita.

Premio de «Literatura Mondo» — Ekzemplero de Enciklopedio de Esperanto, ilustrita eldono al la originala novelo n-ro. 72 «Ĉu kulpo aŭ sorto?» devizo «Siberio-Romsk 1920», bela priskribo kaj emocia rakonto kies aŭtoro estas S-ro. Theodor Kilian — el Trebiĉ — (Ĉeĥoslovakujo).

Premio de Esperanto-Grupo Vic: 50 pesetoj. Temo: komedieto kun kvin roloj. Premiita verko n-ro. 52 — «La edziĝontoj», kies aŭtoro estas S-ro. Raymond Hall el Sheffield (Anglujo).

Premio de «La Pirato», 50 pesetoj. Temo: Kion laŭ internacie aplikata kodo bonedukita homo ne devas fari, eĉ se li estas petolulo. Ni difinis la premion al la verko n-ro. 67. «La bonedukita homo» devizo «Bonhumoro, sana koro», ĉia aŭtoro estas S-ro. Hector Vermuyten el Antwerpen (Belgujo).

Premio de Cooperativa Econòmica Ripollesa: 50 pesetoj. Temo: Prozo aŭ versaĵo laŭdanta la kunhelpadon. Premiita verko estas n-ro. 111 devizita «Kooparatismo kaj Esperanto», aŭtoro S-ro. Ramon Prada el Barcelona.

Premio de «Litaratura Mondo»: Jarkolekto de 1934, al la originala poemo n-ro. 77 «En malbona humoro», aŭtoro S-ro. M. Strümpfel el Lösnitz (Saksujo).

Premio de «Espero Katolika», dujara abono al la gazeto. Verko n-ro. 98 «Pli da amo kaj komprenemo», devizita «Maria Vervasko», kies aŭtorino estas S-rino Maria Schöttl el München (Germanujo).

Libervolaj Temoj:

Originalaj versaĵoj

Premio de la Urbeŝtraro de Ripoll: 100 pesetoj. Ni dividis la premion kaj aljuĝis du kvindekpesetajn premiojn al la verkoj n-ro. 74 kaj 100. Respektive devizitaj «Homoj kaj Laboro» kaj «Amo al Dio nekonata», kies aŭtoroj estas Sinjoro M. Strümpfel el Lösnitz (Saksujo) kaj Sinjoro Leo Belmont el Warszawa (Polujo).

Unuan mencion ni difinis al la verko n-ro. 88 «Libero», devizita «Abelo», kies aŭtorino estas F-ino Madeleine Vuille

(Mad. Mevo) el Genève (Svislando). La poezio estis legita de F-ino Lluisa Castells el Vic kaj estis varme aplaŭdita.

Duan mencion ni difinis al la verko n-ro. 79 «Ārto kaj bello sub la verda stelo», ĝia aŭtoro estas S-ro. Karl Vanselow el Berlin (Germanujo).

Tradukitaj versaĵoj

Premio de Esperanto Societo Paco kaj Amo el Barcelona: 50 pesetoj al la verko n-ro. 12 «Naŭ teatraĵoj», kies aŭtoro estas S-ro. Jaume Grau Casas el Barcelona.

Premio de Heroldo de Esperanto, de valoro proksimume 50 pesetoj. Ĝi estis difinita al la verko n-ro. 39, devizita «The Pier Piper of Hamelin», kies aŭtorino estas S-rino. Louise Briggs el Armley-Leeds (Anglujo).

Premio de Sindicat de Turisme de Ripoll: 50 pesetoj. Aljuĝita al la verko n-ro. 27 «Tri poemoj de Wordsworth» de sama aŭtorino S-ino. Louise Briggs el Armley-Leeds.

Menciindaj verkoj estas n-roj 107 «Pjotr Plorulin» kaj 101 «Donna Klara», kies aŭtoro estas nia bone konata samideano S-ro. Leo Belmont el Warszawa (Polujo).

Originalaj prozaĵoj

Premio de la Estraro de K. E. F.: 50 pesetoj al la verko n-ro. 71 «Porcelana Idilio», kortuŝa rakonto de Sinjorino Lucette Faes-Janssens el Antwerpen (Belgujo).

Premio de la Prezidanto de K. E. F.: 50 pesetoj al la verko n-ro. 30: «Popollegendoj aŭ fokloro», belega priskribo de nia bone konata amikino S-ino. Emma L. Osmond el London (Anglujo).

Menciindaj verkoj: n-ro. 48: «La lunhomo», kies aŭtorino estas F-ino Vera Gutmann el Tallin (Estonujo) kaj n-ro. 46 «Penseroj surpapere» de sama aŭtorino, juna kaj promesplena esperantistino. Ankaŭ specialan atenton meritis la verko: «La Ĉina juĝo kun torturoj», sub n-ro. 73, kies aŭtoro estas D-ro. P. Friedland el Tallinn (Estonujo).

Tradukitaj prozaĵoj

Premio de Esperanto Grupo Ripoll: 50 pesetoj al la longa kaj bela traduko de tirola romano «Jakob Brunner» sub n-ro. 34, kies aŭtorino estas S-ino. Maria Schöttl el München (Germanujo).

XVII KATALUNA ESPERANTO-KONGRESO!
XVI INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ



Fraŭlino EMILIA RIBA, Reĝino de la XVI
Internaciaj Floraj Ludoj.




Fraŭlino Madeleine Vuille (Mad Mevo).
La glora gajnintino de la Natura Floro




Alveno de la kongresanoj



La Reĝino de la Festo kaj ŝiaj Korteganinoj
De maldekstre dekstren: fraŭlinoj Modesta Morera, Mercè
Sala, Maria Sala, Emília Riba, Anneta Coma, Anneta Isi-
dro kaj Teresa Vivet. Knabinetoj Maria Teresa Solé kaj
Maria Mercè Català



La scenejo dum la Floraj Ludoj



S-ro. Francisko Vilà, reprezentanto de la Poetino, akompanas la Reĝinon kaj ŝiajn Korteganinojn al la Festo.



Grupo de kongresanoj dum la ekskurso tra Cerdanya

Premio de Casino Ripoll: 50 pesetoj. Premiita verko n-ro. 35 «Homoj en milito», kies aŭtoro estas S-ro. Karl Minor el Hamburg (Germanujo).

Menciinda verko estas tiu sub n-ro. 40 «Rakonto de Israel Zangwill», kies aŭtorino estas S-ino. Louise Briggs el Leeds (Anglujo).

Unu post la alia la premiitaj aŭtoroj aŭ iliaj reprezentantoj iris ricevi de manoj de la Reĝino siajn premiojn meze de ĝeneralaj aplaŭdoj.

S-ro. Sekretario finis sian raporton per la jenaj vortoj:

«Kaj nun kelkajn lastajn adiaŭajn vortojn. Ni tre multe bedaŭris ke ni ne disponis pli grandan kvanton da aljuĝeblaj premioj por inde premii multajn verkojn, kiuj restis bedaŭrinde nemenciitaj.

» Permesu nun ke mi diru la lastan vorton: Dankon.

» Dankon al vi, bela Reĝino, kiu portis al ni la freŝecon de via juneco kaj la ĉarmon de via persono, simbolojn de la beleco de la urbo, kiu tiel afable gastigas nin. Dankon al vi, korteganinoj, loga bukedo de parfume odorantaj floroj, kiuj ĉirkaŭas la altan tronon de la Belo en tiu ĉi Festo de Fido kaj Amo. Dankon al vi, amikoj, kiuj malavare helpis la taskon de la Komitato donacante valorajn premiojn. Dankon al vi, esperantistaj gazetoj, kiuj publikigis nian alvokon kaj verdikton. Dankon al vi konkursintoj, kiuj kontribuis al la sukceso de nia festo. Vin ĉiujn sendistinge ni gratulas, laŭreatojn kaj nelaŭreatojn, por la nobla emo levi la spiriton al la altaj regionoj, kie trankvilo plene regas. Aginte tiamaniere vi ankaŭ altigis la gloron de nia Patrujo, kies nomo brilos per oraj nuancoj en la Historio de la batalo por lingvo internacia, nur se vi obstine laboras kaj oferas viajn intelektajn fortojn por la venko de nia idealo, la bela lingvo Esperanto. La penso, ke vi havas la honoron partopreni en la enkonduko de tiu perfektiga elemento, kiu transformos la Mondon, stimulu vin pli multe ol miaj sincere diritaj vortoj al persista laborado kronota pli malpli longe per la plej bela, brila venko.

JOAN GILI NORTA

Je la fino de tiu ĉi raporto de S-ro. Gili Norta, oni gratulis lin per longedaŭra aplaŭdado, premiante lian plenumon de la ofico de Sekretario de la Floraj Ludoj.

S-ro. Delfí Dalmau kiu anstataŭis la Prezidanton de la Floraj Ludoj, S-ro. Saldanha Carreira, legis, kaj komentariis en kataluna lingvo, la jenan paroladon:

«Sinjoroj, Sinjorinoj, Geamikoj:

Unue mi min turnas al la katalunaj aŭtoritatuloj, dankante ilian ĉeeston kaj la bonan apogon al niaj laboroj. Reciproke kaj amike ni kombinu ĉiam niajn programojn, ili, donante la forton, kiu ankoraŭ mankas al ni; ni, profitante ĉiujn momentojn kunigi la propagandojn Esperantan kaj Nacian. Al vi, aŭtoritataj Moŝtoj, niajn plej dankemajn salutojn.

Poste, mi devas flustre konfesi ke mi agis, en ĉiuj faritaj laboroj de niaj Internaciaj Floraj Ludoj, kiel vera Prezidanto — mi nenion plu faris krom trarigardi la lertajn klasifikojn de Sinjoroj Capdevila kaj Alberic, kaj konstati la penadon de mia vigla Sekretario S-ro. Gili Norta. Al ili mi adresas publike miajn amikajn gratulojn kaj miajn dankojn pro la honoro de la invito al la prezido.

Ankaŭ al vi ĉiuj, kiuj akceptis mian modestan nomon por kapo de via Komitato, la plej sinceran esprimon de miaj frataj sentoj kune kun grandega peco de mia koro.

Laste, amikan vorteton al la reprezentantoj de la urbaj gazetoj kun peto de malavara helpo al niaj homamaj klopodoj.

Nun, mi petas la atenton de la Reĝino de la Festo, dufoja reĝino pro la homa kaj la natura elektoj — la homoj prave konstatis ŝian belecon kaj la naturo sur ŝin supersutis la ĉarmojn kiuj ravas nin.

Adorinda estaĵo, mia Reĝino I.

Se mia prezidanteco ne estus tiel efemera, se vere ĝi valorus la honoron, kiun amika komplezemo al ĝi konsentas, se ĝi estus io ajn kvazaŭ reĝa krono, ornamita per internaciaj multkostaj floroj kaj perloj, mi prenus ĝin ameme, delikate, kaj, per miaj tremantaj, nervaj manoj, mi surkapigus ĝin sur adorindan kapon.

Reĝino nia I:

La plej humila el viaj vasaloj genufleksas antaŭ vi por ke vi al ĉiuj pardonu niajn grandajn kulpojn.

Al mi la impertinentecon de mia adoro, al la gekonkursintoj la nekapablon verki laŭ viaj meritoj. Ili ĉiuj, premiitoj kaj nepremiitoj, promesas al vi, ho Reĝino, strebe sindoni al Esperanto por prezenti en la proksimaj festoj pli belajn florojn.

Ili promesas rigardi la Internaciajn Florajn Ludojn per severaj okuloj, senindulge forstrekante ĉion kio ne estu inda aperi publike.

Ili promesas esti dum la tuta jaro ĝis la proksima ekspozicio zorgemaj ĝardenistoj kaj kulturistoj mense sian lertecon, por povi honeste, nehonteme, ne trouzante la subanoniman sinkaŝon, oferi al Esperanto la bukedojn kiujn ĝi meritas.

Pardonu, Reĝino, vi, kiu rajtas pardoni.

Vi estas la plej alta, estu grandanima.

Rimarku, Reĝino, kiel alta vi estas. El la tuta mondo ĉiuj sin turnas al la Internaciaj Ludoj por rigardi vin. Kaj via trono, via kataluna trono, verŝajne ne estas entenata en teatro tro malgranda por ĝi, sed sidas en Hispanujo kiel juvelujo nevulgara, vanteza posedi vin, Reĝino, kiel la plej belan simbolon de la lando.

Vi naskiĝis el Natura Floro, vi naskiĝis do el la «Amo», ĉar amo inspiris tiun, kiu vin elektis laŭtakte najtingalan melodion.

Reĝino I. La penso flugas kiel la lumo aŭ pli rapide.

Inter mi kaj viaj premiitoj, kvankam ili estu dissemitaj sur la Tero, la distanco estas nula, ĉar ili spirite ĉirkaŭas vin kaj mi estas kun vi.

Internacian kunfratiĝon Floraj Ludoj trafas.

Kaj la bukedo ne konsistas nur el poeziaj konceptoj pli malpli premiindaj. La etikaj principoj estas praktike la plej valoraj, ligataj, ĉirkaŭbrakataj de Esperanto, kiu senlace, firme, daŭreme, allogas, kunigas, formas la grandan bukedon, el kiu fine naskiĝos la vera, la sensofisma, la de ni dezirata Paco.

Jen, Reĝino, mi ĵus malfermis al vi mian bruston, vi povas vidi kiel batas intime mia koro, eble spegulanta la Esperantajn sentojn de la via. Tiujn-ĉi vortojn mi diras, tiujn-ĉi vortojn mi krias, je la nomo de nia Komitato, je la nomo de ĉiuj konkursintoj, je la nomo de ĉiuj, kies feliĉo kaj fiero estas aparteni al la Esperanta Familio.

Jen, Reĝino, la morala, la homama, la Zamenhofa vidpunkto de ĉiuj viaj vasaloj, la kavariĵoj de la Esperanta Rondo.

SALDANHA CARREIRA

Ovacio aŭdiĝas post la bela resumo de S-ro. Dalmau kaj sinjoro Urbestro prononcas la ritan frazon: «La Festo estas finita».

La Reĝino kaj la Ama Kortego forlasas la scenejon kaj la samideanaro kaj publiko adiaŭas ilin per longa aplaŭdado meze de triumfa marŝo ludata de la muzikistaro.

Poste okazis fotografado de la Reĝino kaj Korteganinoj.

La festo tre bone sukcesis. Ĝi, kiel ĉiam en niaj Kongresoj, estis plej efika pruvo pri la taŭgeco de Esperanto kaj ĝia propaganda valoro estis netaksebla.

Oni bone rimarkis la partoprenon de multaj eksterlandaj samideanoj konkursintaj la premiojn, kio estas aparte kontentiga por ni, ĉar per tio denove montriĝis klare ke ni sukcesis igi plene internaciaj la Florajn Ludojn kaj espereble eĉ en venontaj jaroj kreskos ankoraŭ la nombro de partoprenontoj.

Vivu la Internaciaj Floraj Ludoj!

Oficiala Festeno

Je la dua, en Fonda Paiet, ĉirkaŭ okdek geesperantistoj altabliĝis sub la prezido de la bela Reĝino de la Floraj Ludoj kaj ŝiaj ĉarmaj korteganinoj. Bona manĝo kaj gaja humoro. Ŝercoj, ridoj kaj la kutimaj amikiĝoj en tiaj senceremoniaj komunaj manĝoj. Je la fino la prezidanto donas la parolon al S-ro. Francesc Vilà, reprezentanto de Fino. Madeleine Vuille, kiu unue legas poeziaĵon de Sino. Raimunda Jofrè, loka verkistino, dediĉitan al la kongresanoj. Ĝi estis presita sur pergameno kaj donacita al ĉiu partoprenanto. Poste li deklamas la sekvantan versaĵon:

AL LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ 1935 EN RIPOLL

Ho Floraj Ludoj, kun fidelo,
Mi vin salutas en la glor'
Kaj laŭdas per la verda stelo
Kun sento de sincera kor'.
En lando rava de la helo,
De suno, de natur' favor',
Sub varma, blua la ĉielo,
Vi floru, poezi-trezor'!

La indon ja de via celo
—Kunigi por la kre-labor'
Poetojn al plialt-nivelo —
Aprobas mi, kun ĝoj, fervor'.
Per vi ĉiam poem-juvelo,
Forgita de vers-amator',
Aŭ verko de poet-modelo,
Riĉigas lingvon per valor'.

Al via festo — or-fabelo —
 Mi, malproksima trobador',
 Ne povas — ho de l' sort' kruelo —
 Ĉeesti por la ĝu', honor'.
 Tamen, Florludoj, kun fidelo
 Mi vin salutas en la glor'
 Kaj laŭdas per la verda stelo
 Kun sento de sincera kor'.

Regin', infano de la belo,
 El ĉiuj la plej bela flor',
 Akceptu, do, ho fest-angelo,
 Gratulon de l' balad' aŭtor'.

MAD MEVO (Madeleine Vuille.)

Genève, 1 junio 1935.

La ĉeestantoj entuziasme aplaŭdas la deklaminton, kiu al la bela enhavo de la verkoj aldonis sian altan arton, tiel ŝatatan de ĉiuj katalunaj esperantistoj.

Poste sekvis paroladetoj de S-roj. Jaume Grau Casas, Julio Mangada, Paul Prabucki, Sebastià Chaler, Estivill, Marian Solà, Delfí Dalmau, k. a. La parolado de profesoro Dalmaŭ estis aparte substrekita per aplaŭdoj kiam li aludis fraŭlinon Angela Casadesús kaj S-ron Planes, kiuj estis la animo de la Kongreso. S-ro. Lluís Gaiolà, reprezentanto de la urbestro, faras interesan paroladon kaj deklaras sin esperantisto post kiam li povis konstati kiel bele sonas la internacia lingvo kaj kiel facile ĝi estas parolata de homoj el diversaj landoj. Li promesas ke li subtenos nian aferon ĉe la oficialaj medioj kaj esperas, ke li povos enkonduki esperanton en la programon de la someraj kursoj, kiujn subtenas la urbo. Post la tondra aplaŭdo de la ĉeestantaro, S-ro. Alberic faras resumon de la diversaj paroladoj kaj precipe li akcentas la promeson faritan de la oficiala reprezentanto, pri kio la lokaj esperantistoj bone rememoru por ĉerpi la plej grandan profiton por nia afero. Li finas dankante S-ron. Gaiolà kaj la dolĉajn fraŭlinojn, kiuj prezidas la feston, kaj per tio donas al ĝi la plej agrablan trajton.

Niaj gejunuloj kaj aliaj, kiuj sentas sin eterne junaj, longe dancis kun entuziasmo kaj senlace.

Laborkunsidoj kaj Ekspozicio

Pri la Laborkunsidoj ni publikigos apartan raporton en nia proksima n-ro. Ili estis tre ĉeestataj kaj pri ilia efektiva tasko povos juĝi niaj legantoj el la anoncata raporto. La nova Komitato estas la jena: Sebastià Alberic Jofrè, prezidanto kaj direktoro de KATALUNA ESPERANTISTO; Joan Gili Norta, vicprezidanto; Rafael Gisbert García, sekretario; Samuel Roca Rodó, vicsekretario; Josep M.^a Coll Coll, kasisto; Tomàs Bartroli Noguer, kalkulisto; Eduard Capdevila Buil, bibliotekisto; Josep Banet Tort, administranto kaj Jaume Herp Sanmartí, voĉdonanto.

Ni menciuj, ke ĉe la Ferma Kunsido la prezidanto speciale dankis la lokajn esperantistojn, dank' al kies sindonemo kaj fervoro oni povis havi tiel sukcesplenan Kongreson. La propagando de la Organiza Komitato estis vasta kaj trafa: tial ni povis vidi en Ripoll tiom multajn esperantistojn. Kiom? Ni ne povas respondi kun certeco sed estas fakto, ke oni disdonis 250 kongresinsignojn kaj ne ĉiuj kongresanoj povis ricevi la sian. La prezidanto dankis ankaŭ S-ron. Ferran Montserrat, kiu eldonis la plej belan kongreslibron, kiun ni havis ĝis hodiaŭ. Ni plej bone pagos la sindonemon de la eldoninto mendante multajn ekzemplerojn.

La Ekspozicio estis inaŭgurita en speciala ĉambro de la Urbdomo. En ĝi oni povis vidi la kutiman materialon, kiun ni bone konas, sed kiu aligas la scivolemon de la vizitantoj, en tiu okazo multnombra. La aranĝon ni ŝuldas antaŭ ĉio al nia plej fervora kataluna propagandisto, S-ro. Jacint Comella el Vic, kiu estis brava helpanto de la Organiza Komitato kaj al kies klopodoj ni povas danki, ke franca karavano ĉeestis la Kongreson.

Ekzamenoj

Sub la prezido de profesoroj Delfí Dalmau, Marian Solà kaj Jaume Grau okazis la anoncitaj ekzamenoj. Sin prezentis S-roj. Sebastià Chaler, Samuel Roca, Tomàs Tónico, Josep Banet kaj Josep Coll. La ekzamenitoj bone sukcesis en ĉiuj provoj kaj oni aljuĝis al ili la Diplomon «Atesto pri Lernado».

Amuzoj kaj Vizitoj

Dimanĉon vespere, honore al la kongresanoj, okazis teatra festo en «Saló Comtal». Oni ludis majstre kaj trafe la lirikan

verkon «La nostra puntaire», tra kies scenoj oni konatiĝas kun katalunaj kantoj kaj dancoj.

Lundon posttagmeze, en la sama teatro, la trupo de diletantoj de «Paco kaj Amo» prezentis la amuzan dulingvan komedion de Joan Gili Norta «Amors Esperantistes». Niaj amikoj bone sukcesis en siaj roloj kaj estis longe aplaŭditaj. S-ro. Enric Nin, tenoro, kantis kelkajn katalunajn kanzonojn, du el ili, «Drinkeja Kanto» kaj «Minueto» en esperanto. Nur laŭdojn ni povas dediĉi al la arto de nia kunlaborinto. Fine Orfeó de Ripoll, sub la gvido de S-ro. H. Vilamanyà, regalis nin per altmerita koncerto, kiun fermis nia himno «La Espero» kunkantita de ĉiuj esperantistoj. Je la fino profesoro Delfi Dalmau dankis publike Orfeó de Ripoll kaj per trafa alegorio kunligis la idealon de la esperantistoj kun la muziko, kiu ne havas barojn kaj estas universala.

En Kooperativo «L'Econòmica» okazis la anoncita lunĉo dediĉita al la kongresanoj, lundon tagmeze. Partoprenis multaj gesamideanoj. Tiuokaze ni povis ĝui ankoraŭfoje la kuneston de la Reĝino kaj ŝiaj korteganinoj, ĉirkaŭ kiuj flirtis niaj junuloj kaj aliaj... Tre agrabla kaj simpatia estis tiu festo.

Lundon matene oni vizitis Bibliotekon Mata, Folkloran Muzeon kaj la faman Monaĥejon. Pri ili ni donis vastajn informojn en nia lasta numero. La plimulto de la kongresanoj partoprenis tiujn vizitojn kaj konstatis ke ni ne trograndigis, kiam ni alte taksis dum nia propagando la kulturon kaj arkeologion de Ripoll.

Ekskurso

Ni ne eraris kiam ni supozis, ke la ekskurso al Cerdanya altiros multajn kongresanojn. Pruvo pri tio estas, ke mardon matene, je la sesa, tri aŭtobusoj kun ĉirkaŭ okdek kongresanoj forlasis la ĉarman kongresurbon. Bela tago kaj agrabla malvarmeto akompanas nin dum la aŭtobusoj ruliĝas sur la serpentumanta ŝoseo. La vojo estas tre kruta ĝis la montkolo Toses. Belaj arbaroj, profundaj abismoj kun arĝenta strio en la fundo kaj altaj montpintoj kun neĝo iuloke kantas al ni la belecon de Pireneoj. Nun la aŭtomobiloj facile veturas al la ebanejo kaj baldaŭ ni atingas la landlimon. Nun ni veturas sur francaj ŝoseoj. Dekstre kaj maldekstre plej diverskolora pejzaĝo. Kulturitaj kampoj; tritiko, hordeo, aveno: furagŝo por la brutoj, kiuj sin paŝtas trankvile kaj iafoje venas sur la vojon kaj devigas la ŝoforojn funkciigi la bremsojn por

eviti katastrofon. Jen ni estas en Montlluis. Ni deiras kaj vagas tra la vilaĝo, faras fotojn, rigardas la malnovajn fortikaĵojn kaj fosaĵojn. Denove la motoroj muĝas, la vojo mallargiĝas, ĝia profilo estas kruta. Nun estas malvarme. La abioj kreskas dense, ili havas aspekton de piceoj. Neĝo kuŝas ankoraŭ sur diversaj kaŝitaj lokoj kvazaŭ ĝi elŝteligus for de la sunradioj, kiuj fine venkos ĝin. Rivereto brue saltas sur la rokojn kaj poste dorme silentas sur ebena verda kampo. Ni atingas Les Bulloses kaj denove forlasas la aŭtobusojn por mirrigardi la majeston de la naturo, kiu malavare dismetis en tiu ĉi lando siajn trezorojn. Antaŭ ni sin etendas blua lago en kiu respeguliĝas la impona silueto de monto Carlit (2,920 metroj). Apud ni staras la rifuĝejo de Club Alpin Français, en kiu ni iafoje dum vintro ripozis por grimpi la montosuprojn kaj ĝui la frenezigan skiadon sur densa neĝtavolo. Estas malfrue kaj longa vojo atendas nin ankoraŭ ĝis Puigcerdà, kie tagmanĝo estas mendita. La aŭtomobiloj zigzagas tra la valoj kaj koloj. Ni vizitas ankoraŭ la faman sportocentron Font Romeu kaj Hermitatge sed la halto estas mallonga pro tio ke io interne postulas baldaŭan kontentigon. Ĉirkaŭ la kvara ni atingis Puigcerdà kaj kun granda rapido altabliĝis. Bona apetito konvinkis la hotelestron, ke ni estas praktikaj homoj kaj ne vivas el iluzioj. Ĝis krepusko ni vagis tra la vilaĝo admirante la ĉiuflankajn panoramojn de la bela vilaĝo, kiu, ni esperas, en baldaŭa tempo havos ankaŭ sian katalunan esperanto-kongreson.

Estis mallume ĉirkaŭ ni dum la reveno. Kantoj kaj anekdotoj distris nin en ĉiu aŭtobusa familio. Je la dek-unua ni atingis Ripoll. Unuj, la plimulto, restis por ripozo en la kongresurbo kaj aliaj en speciala aŭtobuso daŭrigis la vojaĝon ĝis Barcelona.

Finaj vortoj

En la historio de nia enlanda movado ni havas novan Kongreson kaj en ĝi, la bela Kongreso de Ripoll havos specialan brilon. Tion ni povos danki al niaj gesamideanoj, kiuj tiel entuziasme kaj diligente laboris por ĝi kaj al tiuj kumbatalantoj, kiuj respondis tiel unuanime al nia alvoko. La sukceso, kiu superis niajn esperojn, estu nova instigo por la daŭrigo de nia laboro. Ĉiu faru en sia loko sian devon kaj nia Kataluna Esperantista Federacio povos iri sian vojon forte, kuraĝe kaj elegante.

La vortoj «anstataŭ» kaj «krom»

Laŭ tute logika fundamenta regulo (oka de la Fundamenta Gramatiko) prepozicio per si mem ĉiam postulas nominativon. Alimaniere: post prepozicio neniam oni uzos akuzativon, kiam ĉi tiu estas signo de rekta komplemento.

Tial oni bezonas scii aŭ bone koni la prepoziciojn, ĉar se la vorto estus konjunkcio anstataŭ prepozicio, tiam oni povus erare ne uzi akuzativon.

Iam mi skribis: «Nenian vorton krom la fundamentajn». Tio estas: «Mi uzis nenian vorton krom la fundamentajn».

Iu korektis mian frazon tiel: «Nenian vorton krom la fundamentajn» (nominative).

Tio ne plaĉis al mi. Mi pripensis kaj traserĉis tra la vortaroj kaj gramatikoj. Ĉie mi legis (Vortaro de Kabe, Kompletta Gramatiko de Fruictier, Plena Vortaro), ke la vorto KROM estas prepozicio. Tiam mi komprenis, kial oni korektis mian frazon.

Sed mi tute ne konsentas, kaj mi deziras rezone pruvi, ke tio ne estas vero, nome: ke vorto KROM (kaj ankaŭ ANSTATAŬ) ne estas prepozicio, sed konjunkcio.

Unue ni difinu.

PREPOZICIO estas senfleksia parolparto, kiu esprimas kunigon kaj dependon inter du vortoj, kaj determinas la klason de dependo aŭ de rilato ekzistanta inter ili.

Ekzemploj:

- a) La libroj DE Mario (Aparteno).
- b) Ringo EL oro (Materio).

KONJUNKCIO estas senfleksia parolparto, kiu ligas du propoziciojn, nur kunigante ilin aŭ difinante ilian dependecon.

Ekzemploj:

- c) Karlo manĝas pomojn KAJ Karlo manĝas pirojn. (Kunigo).

ĉ) Mi kuras KIEL vi kuras. (Komparo).

ELIPSO estas forigo de unu aŭ kelkaj vortoj, kiujn oni ne juĝas nepre necesaj por la kompreno.

Ekzemploj:

- c) Karlo manĝas pomojn KAJ pirojn.

ĉ) Mi kuras KIEL vi. (Tio estas: Mi kiel vi).

Pro elipso, oni diras, ke konjunkcio (krom propoziciojn) ligas frazojn aŭ vortojn. En tia okazo oni povas konfuzi konjunkcion kun prepozicio.

Ekzemploj:

Prepozicioj:

Libro DE Mario.

Ringo EL oro.

Mangi POR vivi.

Kafo KUN lakto.

Konjunkcioj:

Pomoj KAJ piroj.

Mi KIEL vi.

Libroj NEK gazetoj.

NE homoj SED bestoj.

Sed rimarku, por eviti konfuzon, ke prepozicio ligas du vortojn, el kiuj la dua dependas de la unua kaj rolas malsaman gramatikan funkcion, kaj ke ĉe konjunkcio la du vortoj estas reciproke nedependaj kaj rolas egalan gramatikan funkcion.

Ekzemploj: Johano vidis la libron (akuzativo) de (prepozicio) Mario (genitivo). Mi (nominativo) kiel (konjunkcio) vi (nominativo) estas sana.

* * *

Nun ni iru al la vortoj KROM kaj ANSTATAŬ.

Atentu la du frazojn:

1 Kafo anstataŭ lakto (aŭ kafon anstataŭ lakton).

2 Hundon krom katon (aŭ hundon krom katon).

Ŝajne ANSTATAŬ kaj KROM estas prepozicioj, sed rimarku, atentu:

1 Ĉu mi trinkas kafon?

2 Ĉu mi trinkas lakton? (aŭ Ĉu mi ne (nea vorto) trinkas lakton?).

3 (1+2) Mi NE trinkas lakton SED mi trinkas kafon. (NE... SED estas konjunkcio) = Mi NE trinkas lakton SED kafon = Mi trinkas kafon ANSTATAŬ lakton.

NE... SED = ANSTATAŬ.

ANSTATAŬ, do, estas konjunkcio. Ĝi estas nea kontraŭeca konjunkcio.

* * *

1 Mi havas hundon.

2 Mi havas katon.

3 (1+2) Mi NE NUR havas katon SED mi havas hundon = Mi NE NUR havas katon SED hundon. (NE NUR... SED estas konjunkcio) = Mi havas hundon KROM katon.

NE NUR... SED = KROM.

KROM, do, estas konjunkcio. Ĝi estas plieca aŭ apartiganta konjunkcio.

Eble mi insistos pri la sama afero.

SAMUEL ROCA I RODÓ

Barcelona, 15^a de junio de 1935.^a